EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj


**EKO 2023 / 13. Februaro 29, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

# Malto kaj Hungario kreskigas kulturajn ligojn

"Kalocsay karesas la vortojn kvazaŭ multekostajn ŝtonojn, ŝanĝante ilian brilon laŭ la lumfalo kaj inkrustante ilin en siajn versojn, ĝuste sur tiu loko, kie ili ravas la rigardon." ( G. Waringhien)

Ni ankaŭ en la malta danke al la granda malta poeto Carmel Mallia... kaj lia malta traduko similas al tiu Esperantlingva de Kalocsay, (nome) Li laboris el la Esperanta traduko de Kolomano Kalocsay. Tio estas la nura hungara literaturo en la malta. La Maltanoj denove enamiĝis al sia lingvo kaj multe legas en ĝi, dum infanoj jam parolas preskaŭ la anglan sole en la infanĝardenoj. Cetere la angla estas konstitucie oficiala lingvo en Malta.



Kelkaj lingvoj indiĝenaj en Eŭropo - kiel la malta kaj la hungara - estas jam en danĝero, ne nur la lingvoj de indianoj en la praarbaroj... Okaze de la tago de la gepatra lingvo, sekvontfoje ni afiŝu ne nur indianojn...

Krom Carmel Mallia, eble ne plu estas esperantistoj en Malto. Nun li laboras pri la traduko de la poemo de Sándor Petőfi 'La Juĝo' - surbaze de la tradukoj de Kolomano Kalocsay kaj mia. Carmel Mallia transdonis la dramon ankaŭ al la teatro. Eble ĝi estos surscenigita. Tiam ni iru al la

spektaklo kaj invitu tiujn el Bruselo, kiuj ankoraŭ dubas pri la kultura fono de Esperanto.

Inter aliaj, Roberta Metsola, prezidanto de la Eŭropa Parlamento, Vanessa Frazier, la malta prezidanto - en februaro - de la Sekureckonsilio de UN, kaj la ĉefoficisto de Malto respondeca pri UNESKO-aferoj, ricevas donacajn ekzemplerojn. Eble estos krommendoj, por ke la ĉefaj lernejoj kaj bibliotekoj de Malto havu la libron, tio estos jam parto de kulturdiplomatio de Hungario.

Veterana hungara Esperantisto Jozefo Horváth eldonis la libron.  Kun granda respekto kaj plej bonaj deziroj al Majstro Mallia!

István Szabolcs, estrarano EEU, komitatano A por Hungario

## Tago de la Gepatra Lingvo bone sukcesas

Ĉi-jare la respondo de la esperantista komunumo al la kampanjo subtene al la internacia tago de la gepatra lingvo estis tre pli granda ol kutime kun traduko de niaj materialoj al deko da barataj lingvoj, al la ajnua kaj okinava [Japanujo], al la luoa [Sudano kaj najbaraj afrikaj landoj]. Por multaj el la tradukoj mi devas danki al Giridhar Rao el Barato, kaj jen nova paĝo en la retejo de la japana landa asocio, farita de Hirojuki Jokojama: https://www.jei.or.jp/2023-gep-ling/.

Nekredeble efike laboris Rafael Lima de la novjorka oficejo de UEA: https://drive.google.com/drive/folders/1vdh-_js7fOvt_xGVIKX_3HDu3q43gZcT, kies paĝo estas atentata de la usona Koalicio por lingvaj rajtoj.

La kreinto de la afiŝo estas la iama estrarano de UEA  Stefano Keller.

Renato Corsetti.

## Briĝo – la komplika kartludo klarigita en Esperanto

Se vi volas ricevi informojn pri tiu kvarpersona ludo, iru al la retejo de STEB : http://eventoj.hu/steb/vortaroj/brigxo.pdf

### Briĝo

**Briĝo** estas kartludo por kvar ludantoj, dividitaj en duopojn, nomatajn ankaŭ *flankoj* (duopo batalas kontraŭ duopo). La ludo konsistas el sinsekvaj *disdonoj*, ĉiu el kiuj havas du fazojn: la aŭkcion kaj la kartludadon. Brigo estas posteulo de la kartluda familio visto, kiu ankaŭ inkluzivas pikojn kaj kerojn.

La briĝo ligiĝas al inicianto Culbertson. Tiu ĉi artikolo priskribas la klasikan robrobriĝon, kiun oni kutime ludas inter amikoj. Ekzistas ankaŭ kelkaj aliaj variantoj de la ludo, la plej gravaj estas turnirbriĝo kaj Ĉikago-briĝo (la diferencoj koncernas precipe la poentokalkuladon).



Kvinlingva vortaro pri briĝo estas trovebla en STEB (la hungara retejo por la Scienca kaj Teknika komunumo): http://eventoj.hu/steb/vortaroj/bridge.htm

## Infana Kongreseto por Torino

Lige kun la 108-a UK en Torino okazos samtempe, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023, ankaŭ la 51-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) meze de la Parko La Mandria, apud Torino, Piemonto, Italio. Bonvenon viziti la retejon de IIK: iik.uea.org.

La temo de la kongreseto estas “Sporto kaj Naturo”.

La programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli en Esperanto en natura medio. Okazos ludoj kaj sporto, natursciencaj atelieroj kaj biciklado, manlaboroj kaj kantoj, ekskurso kaj certe Esperanto-kursoj. Vesperaj ludoj kaj interesaj vesperaj agadoj atendos la infanojn kaj adoleskantojn. Eksciu pli pri la programo.

IIK bonvenigas partoprenantojn de diversaj aĝogrupoj, kiuj parolas Esperanton (minimume – scipovas baze kaj klare esprimi siajn bezonojn kaj dezirojn en Esperanto):

- infanoj kaj adoleskantoj estas la kutimaj IIK-partoprenantoj
- adoleskantoj ekde 17 jaroj kaj fluparolantaj povas fariĝi helpantoj
- infanoj ĝis 7 jaroj kutime bezonas gepatron/prizorganton/vartiston dum IIK.

En la retejo vi trovos pliajn informojn kaj la aliĝilon, kie ĉiu infano povas indiki siajn ideojn por la programkontribuoj, kio certe eĉ pli riĉigos la eventon. Pri ajnaj demandoj bv. skribi al infana.kongreseto@gmail.com. Aliĝu frue - la unua speciala aliĝperiodo finiĝos jam **fine de februaro**!

Ni ankaŭ invitas vin subteni la partoprenon de infanoj/adoleskuloj el nepagipovaj landoj en la IIK per mona donaco al la kongreseto (uea.org/alighoj/donacoj UEA-kontoj: *Adoptaj Gepatroj* kaj Infana kongreseto). Ni kore dankas ĉiujn donacantojn.

Bert Schumann, Francio

## Kurso en Kostariko kaj Usono

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Komencanto en Monteverde
Gvidantonomo: Silvio Curtis
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Monteverde, Kostariko
Aldoninto: Silvio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27517

Nomo: Meznivela tradukogrupo
Gvidantonomo: Silvio Curtis
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Losanĝeleso, Usono
Aldoninto: Silvio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27516

## Ĉarma animita filmo el Francio

La filmo montras diversajn bestojn, kaj enhavas bazajn frazojn en facila Esperanto.

Olivet, collège La Providence, 2022: Esperanta animacio

## Novaĵoj el Ĉilio

Dum sia Ĝenerala Asembleo, okazinta per Zoom, la 21-an de januaro 2023, Ĉilia Esperanto Asocio (ĈEspA) elektis novan estraron : Jose A Vergara, prezidanto, Ronald Keith, sekretario, Ivan Mättig, kasisto, Duŝan Juretiĉ kaj Felipe Sanches, Estraranoj.

De la 17-a ĝis la 19-a de februaro, ĈEspA okazigis Someran Esperanto-Tendaron en Codegua. Salutis la feriantojn, nome de UEA, la kunordiganto de la Amerika Komisiono, Guy Matte. Interalie, oni parolis pri la venonta Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE), okazonta en Fortaleza, Brazilo en novembro 2023.

Sendis: Alessandra Madella, ILEI

## Franca kaj slovena lernejaj grupoj vidigas sin

Danke al la instruistoj Emmanuel Desbrières kaj Peter Grbec, jen resumo de la unua lerneja retkunveno inter gelernantoj de Salins-les-Bains (Francio) kaj Koper (Slovenio), la 23-an de januaro 2023. La francaj gelernantoj nur eklernis Esperanton dum 5 horoj antaŭ tiam. Ĉeestis la prezidanto de ILEI, Ahmad Mamduhi.

Retkunveno inter francaj kaj slovenaj gelerantoj, 2023

========= vortoj:  935 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute estas ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

RM ene feb 26